

Alexander Puschkin,
К....

Alexander Puschkin,
Al...

Alexander Puschkin,
Al....

*tradukita de Manfred
Retzlaff*

*tradukita de Manfredo Ratisla-
vo*

*Esperantigo laŭ la rusa origina
teksto.*

*Esperantigo laŭ la germana tra-
duko de Karoline Jänisch*

Я помню чудное мгновенье:
Передо мной явилась ты,
Как мимолетное виденье,
Как гений чистой красоты.

Memoras ofte mi pri tio:
aperis iam vi al mi,
samkiel fuĝa mir-vizio,
de l' pura belo la geni'.

Momenton vi ja estis mia,
vi foje staris antaŭ mi,
Vi pura ideal' gracia
de l' belo efemera vi.

В томленьях грусти
безнадежной,
В тревогах шумной суеты,
Звучал мне долго голос нежный,
И снились милые черты.

En la turmentoj de l' ama-
raj
afliktoj kaj melankoli'
aperis viaj trajtoj karaj,
la mildan voĉon aŭdis mi.

Dolor-espere sopirante,
en la bruado de l' homar'
la dolĉan voĉon ekaŭdante,
mi songis pri l' okulo-par'.

Шли годы. Бурь порыв
мятежный
Рассеял прежние мечты.
И я забыл твой голос нежный,
Твои небесные черты.

La jaroj pasis, forbloviĝis
subite tiuj songoj ĉi,
la belaj trajtoj ekpaliĝis,
forĝesis vian voĉon mi.

Sed dum la viv-batal' multja-
ra,
dum la restado en la sol',
paliĝis la memor' de l' kara
aspekto via kaj parol'.

В глуши, во мраке заточенья
Тянулись тихо дни мои
Без божества, без вдохновенья,
Без слез, без жизни, без любви.

Kviete pasis tagoj miaj
en la ekzil', sen emoci',
sen Dio, sen inspiroj iaj,
ne ploris, vivis, amis mi.

Mi jarojn en karcero restis,
ne kredis plu je l' kara Di',
malplena mia brusto estis,
ne ploris, vivis, amis mi.

Душе настало пробужденье:
И вот опять явилась ты,
Как мимолетное виденье,
Как гений чистой красоты.

Vekiĝis nun animo mia,
kaj ree ekaperis vi,
samkiel fuĝa vid' vizia,
de l' pura belo la geni'.

Saniĝas nun animo mia.
Vi ree staras antaŭ mi,
vi pura ideal' gracia
de l' belo efemera vi.

И сердце бьется в упоенье,
И для него воскресли вновь
И божество и вдохновенье,
И жизнь, и слезы, и любовь.

Nun ree batas kun sentemo
en mia brusto mia kor',
inspir' revenis kaj kredemo
kaj viv' kaj am' kaj ree plor'.

Nun ree batas kun pasio
La vekiginta kor' en mi,
denove ardas ĝi por Dio
kaj vivas, ploras, amas ĝi.

...

...

...

Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas
ALEXANDER PUSCHKIN (*1799-05-26 – †1837-01-29).

Arg-305-616 (2005-04-22 16:27:34)

*Traduko de la Rusa poemo “K...” de ALEXANDER PUSCHKIN (*1799-05-26 – †1837-01-29) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2006-09-20.*

MR-153-6 / Arg-305-730 (2006-12-04 12:17:37)

*Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff, *04.11.1938) en Decembro de 2000 laŭ la origina rusalingva teksto.*

*Traduko de la Rusa poemo “K...” de ALEXANDER PUSCHKIN (*1799-05-26 – †1837-01-29) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-05.*

MR-153-2a / Arg-305-618 (2006-09-20 09:31:05)

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, faris laŭ la germanigo de s-ino Karoline Jänisch (Pawlowa).